**EKO 2025-41, Oktobro 25.**

**Senpaga virtuala kurso por hispanlingvanoj**

Ĉiujare **UEA** kaj la Kolombia Landa Asocio, KEL, organizas Esperanto-kurson por hispanparolantoj kaj instruas al centoj da homoj. Ĉi tiun jaron, aldone al la baza E-kurso por hispanparolantoj okazos meznivela kurso tute en (malrapida kaj simpligita) Esperanto, do neniu scio pri la hispana aŭ alia lingvo estos necesa, vi povos plibonigi vian Esperanton rekte per Esperanto.
La meznivelaj instruistoj havas C2-KER-atestilon kaj aldone al lecionoj vi povos partopreni en konversaciaj rondoj, legogrupoj, ludoj, prelegoj kaj aliaj.
Senpage aliĝu tujtuje kaj finfine plibonigu vian Esperanton!
https://esperantokurso.com/eo/

Ĉi tiu grupo temas pri universitato, en la jaro 2024 ni komencis kunlabori kun BUAP (Benemérita Universidad Autónoma de Puebla), la kvina plej granda meksika universitato, la universitato oficiale registris nian kurson kaj ofertis ĝin al siaj studentoj. Ĉi tiun jaron ni ankoraŭ progresas pri burokratiaĵoj kun ili (tial ankoraŭ ni ne mencias ilin en nia retejo), sed espereble ĉi tiu kurso estos prezentata kiel aldona elektebla kurso por ĝiaj studentoj.

Luis Obando, Kolombio

**Kion ni faru pri la renoma domo?**

La 26-an de septembro 2025, la Estraro kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA sendis al la

Komitato de UEA kvarpaĝan raporton pri la oficeja domo ĉe Nieuwe Binnenweg 176 en Roterdamo. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/uea-97/. /

**Novaj retkursoj de Esperanto en oktobro kaj novembro**

La Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando, organizas **internacian mezgradan kurson – B1.** Ni invitas al ĝi! Bv. diskonigi. Okazas varbado ankaŭ al kurso **A1** por pollingvanoj. Eble vi konas iujn, al kiuj oni povus sugesti lernadon de Esperanto? Post la fino de la lernado oni ricevas belan dokumenton: oficialan konfirmilon de ĉi tiu fama universitato pri partopreno en la kurso, enhavantan, aldone, la internacian signon de la plej alta nivelo en lingvoinstruado.

Maria Majerczak, Krakovo, Pollando

**Kvara bonfara**

Fine de septembro 2025, okazis la oficiala apero de la albumeto "Je la kvara"... malkovrenda ĉi tie: https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/446-kaj-tiel-plu-elŝipigis-je-la-kvara-n.html/ Bildo en la PDF

**Korea kongreso ĉefurbe**

La 51-a Korea Kongreso de Esperanto okazos dum 25-26 Okt. 2025 en Seulo: kadre ankaŭ okazos kunsido de IKEF-KR mendita de la korea IKEF-ano Vasto Hoseop LEE. Ankaŭ IKEF sendos sian vicĝ.sekretarion Grando ZHANG Wei kiel delegiton de IKEF ĉeesti la kunsidon de IKEF-KR. Viaj ĉeestoj estos bonvenaj! Senhezitu kontakti kun Grando(790862338@qq.com) kaj Vasto(hoseop1@naver.com). Dankon!

Prezidanto de IKEF, Ĉielismo WANG Tianyi, chielismo@qq.com; http://ikef.info

**Germano en Sidnejo**

Germano vizitis nin en la Esperanto-domo de Sidnejo. Martin Haase estas la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio kaj profesoro en germana universitato.

Li jam estis tre aktiva Esperantisto kiel junulo dum la okdekaj jaroj. Tiam mi konatiĝis kun li. Inter 1980 kaj 1984 mi ofte renkontis lin, ni ambaŭ partoprenis en TEJO kongresoj, en la germanaj Internaciaj Seminarioj, en franc-germanaj junularaj renkontiĝoj,. Bildo en la PDF.

**Interlingvistoj kontentaj**

Nun haveblas la numero 133 de Informilo por Interlingvistoj (IpI).

IpI - kaj ĝia anglalingva versio, IfI - estas eldonitaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Niaj novaĵleteroj disponigas informojn kaj ĝisdatigojn pri interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por esploristoj kaj ĉiu, kiu interesiĝas pri lingvopolitiko, Esperantologio kaj rilataj temoj.

https://interlingvistiko.net/wp-content/uploads/2025/10/IpI133.pdf

La antaŭaj numeroj de IpI estas disponeblaj en:
https://interlingvistiko.net/informilo-por-interlingvistoj-arkivo/

ipi@interlingvistiko.net

**La aŭtuna ondo – kun ondo da literaturaĵoj**

En nia elŝutejo aperis la septembra/aŭtuna eldono de *La Ondo de Esperanto*, 2025, №3 (325) kun ĉirkaŭ 80 tekstoj sur riĉe ilustritaj 140 paĝoj. Ĝi entenas plurajn artikolojn pri la “Kongresa Sezono en Esperantujo”.Se vi ankoraŭ ne elŝutis ĝin, bonvolu veni al nia elŝutejo: https://esperanto-ondo.ru/Aktualaj/Ondoteko.php
La dosieroj (“pdf” kaj “ePub”) estas elŝuteblaj per viaj “nomo” kaj “pasvorto”. Se vi forgesis ilin, skribu al ni kaj ni resendos ilin al vi.

Bonvolu atenti la redakcian artikolon pri grava ŝanĝo en nia gazeto (paĝo 5): en 2026 aperos tri “maldikaj” (kelkdek-paĝaj) kaj unu tre ampleksa (pli ol 200-paĝa) eldonoj.
La lasta “Ondo” por 2025 aperos ĉirkaŭ la jarŝanĝo. Jam nun vi povas pagi vian kotizon por 2026.
La abonkotizo ne ŝanĝiĝas dum pluraj jaroj (Abonanto € 15, Amiko € 30 Patrono €100)

Halina Gorecka (eldonanto), Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

**Konga Stelo, afrika belo**

Denove mi prezentas al vi la 6-an numeron de nia kara diversa informilo, Konga Stelo. Kontribuis al ĝi per artikoloj ne nur kongolandanoj, dankon al ĉiuj ili. Vi povas libere elŝuti tiun numeron kaj la antaŭajn numerojn el:

https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo.

Joel Muhire, la redaktoro.

**Hispanaj universitatoj agas per Esperanto**

Legu artikolon pri la neĉeestaj kursoj de Esperanto en hispana universitato UNED en Libera Folio : "Unikaj retaj kursoj sur universitata nivelo"

https://www.liberafolio.org/2025/09/30/unikaj-retaj-kursoj-sur-universitata-nivelo/

**La 64-a Universitata Kunpensado**

Jen la registraĵo de la sesio en la jutuba kanalo de UEA:
https://www.youtube.com/watch?v=7P3rF5qW5KM

Ahmad Mamduhi, prezidanto de ILEI

**Ekzameneblo en Hispanio**

Bv noti ke eblas aliĝi al la niveloj B1 kaj B2 eĉ se oni ne konas la hispanan, kaj ankaŭ eblas ekzameniĝi en pluraj urboj ekster Hispanio,  ĉefe en Eŭropo kaj Latinameriko.

José Antonio del Barrio, http://www.delbarrio.eu

**Prelego Koutny en podkasto**

Mi ricevis interesan novaĵon ke nia artikolo (kun Milan Kolka) pri la uzo de temvortaro en instruado estas prezentita en mallonga podkasto pere de AI.

Jen: https://www.academia.edu/ai_podcast/128532139

Ilona Koutny

Ondo da informoj koncize prezentata

Ekde la 1-a de januaro 2020 ĝis la 30-a de septembro 2025, dum 2100 sinsekvaj tagoj (= kvin jaroj + naŭ monatoj) en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto. En la retejo jam aperis 4152 tekstoj, kiujn garnas 5413 ilustraĵoj. Legu pli pri la retejo kaj vidu la liston de la 15 plej legataj tekstoj ĉe https://sezonoj.ru/2025/09/ondo-149/

Okazis la 64-a universitata kunpensado

Ahmad Renza Mamduhi: Kurso pri Interlingvistiko por Universitato Espoir (DRK)

Bernhard Tuider:  Eo en la Nacia Biblioteko de Austrio kaj Eo-kurso en la Universitato de Innsbruck. Organizos kaj gvidos Alessandra Madella kun la helpo de Viko kaj Ahmad Reza Mamduhi.     Esperanta revuo agnoskita  en Italio

Mi ĝojas anonci ke la revuo Esperantologio-Esperanto Studies (EES) hodiaŭ estis oficiale agnoskita kiel scienca revuo fare de ANVUR, la itala nacia agentejo por taksado de universitatoj kaj esploroj. Por tiuj, kiuj laboras en italaj universitatoj, tio signifas, ke publikaĵo en EES validas por akademiaj karieroj en "fako 10" (filologio,literaturo, lingvistiko). Por aliaj, ĝi estas oficiala agnosko de registara agentejo, kiu donas prestiĝon al la revuo. Mi dankas Christopher Gledhill kaj Klaus Schubert por ilia grava atingo. Same estas grava rezulto ankaŭ por CED (Centro por esploro kaj dokumentado
pri la mondaj lingvaj problemoj) kiu respondecas pri la revuo.

Michele Gazzola